


---

---

# LA DEK-SEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET  
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc. — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.  
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :  
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

---

---

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,  
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.  
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

---

### Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu  
les Mercredis 7 Mai et 4 Juin 1913, à 8 heures très  
précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.  
Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

---

### Prochaines Réunions.

- 7 Mai. 8 heures. — Diner mensuel.  
10 heures. — Discussion en Esperanto : Temo : « Je  
kiu ago oni devas edziĝi ». Diskutado malfermota  
de S-ro H. van Etten.
- 14 Mai. 9 heures. — Lecture en Esperanto de M. de Coppet.  
10 heures. — M. Millien : « Impressions de Cochinchine ».

- 21 Mai. 9 heures. — Lecture par Mlle Talvat.  
10 heures. — M. Daniel : « Le pôle Sud » (lumbildoj).  
28 Mai. 9 heures. — Lecture par M. Lhermitte.  
10 heures. — M. Chilard : « Munich et Nuremberg »  
(lumbildoj).

\*  
\* \*

NOTA. — Le Secrétaire devant être absent du 15 au 31 Mai, adresser pendant cette période toutes les communications concernant le Groupe à *M. Henry van Etten, 10, rue Vivienne, Paris.*

*Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.*



## Promenade de la "Dek-Sepa" à Brunoy et la vallée de l'Yerres.

Dimanche 4 Mai 1913.

Rendez-vous à 7 heures  $\frac{3}{4}$  précises devant la Gare de Lyon, au pied de la grosse horloge.

Départ du train . . . . . 8 h. 15 matin.  
Arrivée à Brunoy . . . . . 8 h. 43 »

De Brunoy, promenade jusqu'à Mandres (45 minutes), par la route dominant la vallée de l'Yerres. (On trouve des provisions à Mandres). Déjeuner au bord de l'eau, près du moulin Rochopt, et promenade en canot sur la rivière (coût : environ 1 fr. par personne pour l'après-midi).

Retour par Brunoy à . . . . . 6 h. 54 soir.  
Arrivée à Paris . . . . . 7 h. 20 »

Prière instante d'envoyer son adhésion accompagnée de 1 fr. à M. Robert Bollack, 95, avenue Victor-Hugo, Paris, jusqu'au 2 Mai, dernier délai. Toute adhésion reçue après cette date serait nulle et non avenue.

Gegrupanoj, alvenu multaj kaj venigu viajn amikojn !

**Avis important.** — Il est de toute urgence que tous les membres de la « Dek-Sepa », qui prendront part à l'excursion, portent de façon très apparente leur insigne, pour faciliter le contrôle au chemin de fer.



## Société Française pour la Propagation de l'Esperanto.

---

Il a été dit au dernier numéro de « La Dek-Sepa » que l'Assemblée des Délégués de la S. F. P. E., assemblée qui a eu lieu à Toulouse, le 23 Mars 1913, a décidé de modifier l'article 9 des Statuts votés à Lyon en 1911.

Voici le nouvel article 9 tel qu'il résulte de la modification en question :

« L'Assemblée est composée de délégués nommés à raison de un par groupe, chaque délégué ayant autant de voix que le groupe compte de membres. Les groupes ayant un nombre de membres supérieur à cent, pourront nommer un délégué par cent membres ou fraction de cent supérieur à dix ; l'ensemble de ces délégués aura autant de voix que le groupe compte de membres. »

Les autres articles des Statuts (ces Statuts ont paru dans la « Dek-Sepa » de Juin 1911) restent en vigueur.

---

## La Monato Esperantista

---

La diversaj Federaciaj Kongresoj okazos en Franclando dum Majo : en Meaux, la 25-an de Majo okazos la Kunveno de la Federacio de la Paris'a Regiono ; en Auxerre, dum Pentekosto (11-12-an de Majo), la Kongreso de la Federacio de Bourgogne kaj Jura, kaj je la sama dato, en Valence, la Kongreso de la Federacio Rhodanienne.

En Chambéry fondiĝis Grupo : « Verda Stelo », sub la prezidanteco de nia konata amiko, profesoro M.-J. Evrot.

Propaganda festo okazis en Vanves (apud Paris), la 2-an de Marto.

La Grupo Esperantista de Beaune festis, dum Februaro, la dekan datrevenon de sia fondiĝo.

En la laborista rondo, niaj samideanoj tre vigle laboras ; multaj propagandaj paroladoj okazis en diversaj kvartaloj de Paris, en Amiens, Tours, k. t. p.

En Christofsgund (Aŭstrolando) fondiĝis nova grupo.

Novaj kursoj malfermiĝis en Gummersbach (Germanlando) kaj Philadelphia.

En s'Gravenhage (Nederlando) okazos, la 27-an de Julio 1913, la nacia Nederlanda Esp. Kongreso.

La tutaŭstra Esp. Kongreso okazos en Graz, dum Pentekosto (Majo 1913).

En nia lasta numero, ni parolis franclingve pri la nacia Franca Esp. Kongreso, kiu okazis en Toulouse; por niaj legantoj, kiuj ne scias la francan lingvon, ni devas sciigi ilin, ke tiu Kongreso, kiu okazis dum Pasko, en suda parto de Franclando, estis grava sukceso por nia afero. La kongresanoj estis akceptitaj en la Urbdomo de Toulouse kaj Urba Konsilanto prezidis la propagandan paroladon kaj la festenon.



Nova gazeto fondiĝis: «*Espero Teozofia*» (145, boulevard Malesherbes. Jarabono kun aliĝo al Teozofia Ligo: 2 fr. 50 = 1 Sm.)

*Plezure ni vidas la informilon en Esperanto pri « Tutlanda ekspozicio de religia arto kaj ludado de misteraj teatraĵoj ».* Tiuj ekspozicio kaj teatraĵoj okazos en s'Hertogenbosch (Nederlando), de Junio ĝis Septembro en 1913.

Ankaŭ en Esperanto estis sendita cirkulero por la VI-a konkurso de rozkulturistoj en Paris (Bois de Boulogne, Bagatelle).

Tiuj ekzemploj montras, ke la peresperanta propagando antaŭeniras pli kaj pli.



Nia konata samideano Paul Fruictier, en artikolo titolita «*Interna Propagando*», diras en *Le Monde Espérantiste*:

«*Tre certe la persona influo de kelkaj estroj havis ankaŭ favoran efikon al la kreskado de nia afero, tion mi ne neas, sed se oni konsideras la nekalkuleblan malbonon kaŭzitan al Esperanto dum la lastaj jaroj, de l'agitado farita pri estrecaj demandoj, oni devas konkludi, ke ne ekzistas alia rimedo, por restarigi inter ni la necesan, necesegan pacon, ol malpligrandigo de la potenco de niaj estroj kaj precipe severa limigo de la daŭro de ilia estrado.*»

Tiujn vortojn ĉiuj fidelaj Fundamentistoj aprobas ; ni batalas por belega ideo kaj ne por triumfigi personon, eĉ kiam tiu persono havas niajn opiniojn. Esperanto estas ideo ; Esperantistoj estas homoj ; ni do batalu ne per Esperanto por Esperantistoj, sed per Esperantistoj por Esperanto !

*Robert Bollack.*



## **L'Esperanto à Paris et en Banlieue.**

La prochaine réunion des Groupes Espérantistes indépendants aura lieu le Jeudi 8 Mai 1913, à 9 heures du soir, au siège des réunions du Groupe Fundamentiste Paris-Est, au Café du Tambour, 10, Place de la Bastille, Paris.



Le Congrès de la Fédération Espérantiste de la Région Parisienne aura lieu à Meaux, le 25 Mai 1913.



La « Zamenhofa Artista Adeptaro » organise une fête le Samedi 17 Mai 1913, en soirée, Brasserie de Valois, 9, rue de Valois, Paris. (S'adresser à M. H. van Etten, 10, rue Vivienne, Paris.)



Nous avons le plaisir de faire savoir à nos lecteurs que Madame Diou-Trouillon, membre de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », est rédactrice en chef d'une nouvelle Revue Espérantiste, « Espero Teozofia ». Abonnement (avec adhésion à la Teozofia Esperanta Ligo) : 2 fr. 50 par an. (S'adresser à Madame Diou-Trouillon, 145, boulevard Malesherbes, Paris.)

---

### **OUVRAGES de M. Henri de Coppet.**

*En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».*

L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons . . . . .	fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de 2800 phrases de la vie usuelle . . . . .	fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof, édition pour tenor ou soprano . . . . .	fr. 1,50

Nous avons reçu la communication suivante :

## **Société Industrielle & Commerciale Espérantiste de France**

La Société Industrielle & Commerciale Espérantiste de France a tenu son Assemblée générale annuelle le 17 Mars et cette réunion a été suivie d'une Assemblée générale extraordinaire, dans le but de modifier les Statuts.

Il résulte des modifications adoptées à l'unanimité que S. I. C. E. F. peut autoriser la création de Sections en Province et nommer des Membres Correspondants qui jouissent d'avantages spéciaux, en France et à l'Étranger.

La Société Industrielle et Commerciale Espérantiste de France accepte, d'après les dispositions adoptées, les Sociétés et Groupements industriels et commerciaux, espérantistes ou non, et les Associations ne s'occupant pas de questions industrielles ou commerciales, dans des conditions particulièrement intéressantes pour leurs Membres.

Les nouveaux Statuts sont à l'impression et seront envoyés sur demande adressée au Président, qui fournira également tous les renseignements qu'on voudra bien lui demander.

Adresser la correspondance ainsi que les adhésions au Siège Social, 18, avenue Philippe-Auguste, Paris-XI<sup>e</sup>.

*Le Président,*

**ERNEST ARNOULT**

Ingénieur E. P. C.

Vice-Président de la Chambre Syndicale  
des Constructeurs d'Usines

Conseiller Général de la Mutualité  
Industrielle.

---

## **LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL**

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.



## ANTAŬ LA MORTO

La lastaj vortoj skribitaj de la angla esploristo Kapitano Scott.

La 18. de Januaro 1912, la angla Kapitano Scott atingis la Sudan Poluson, sed malpli feliĉa, ol lia antaŭulo, la Norvego Amundsen, li pereis kun ĉiuj siaj akompanantoj dum la reiro.

Kuraĝe, sentime, li vidis Morton alvenantan, kiel pruvas emocianta dokumento trovita sur lia kadavro, de kiu dokumento ni jene reproduktas la lastan paĝon, skribitan dum la tagoj de agonio.

### LETERO AL LA PUBLIKO

Tiu malfeliĉego ne estas ŝuldata al difekta organizado, sed unike al la malbona sorto, kies batojn ni riskis.

1-e : La perdo de miaj ĉevaletoj en Marto 1911 devigis min foriri pli malfrue ol mi volis, kaj necesigis, ke mi limigu la provizaĵojn kunportitajn.

2-e : La malbela vetero haltigis nin dum la tuta vojaĝo, kaj precipe de la 83-a grado.

3-e : Falado de malgrandpeca neĝo, ĉe la malsupro de l' glacimonto, tute senmovigis nin.

Energie ni kontraŭbatalis tiujn kontraŭajn elementojn, sed en tiu batalo ni elĉerpis ĉiujn niajn provizaĵojn.

Ĉiu detalo de nia organizado : niaj rezervoj de nutraĵoj, de vestaĵoj, fine ĉiuj niaj provizaĵoj, enfositaj sub la glacio laŭ longa distanco da 700 mejloj, perfekte utilis al ni, ĉu irante al la Poluso, ĉu reirante. Nia areto estus do povinta reveni al la glacimonto en bonega stato kaj kun troaj provizaĵoj, se ne estus okazinta la konfuzanta senfortiĝo de la homo, de kiu oni povis malplej esperi tian aferon. La ŝipisto Edgar Evans ŝajnis la homo la plej forta el nia anaro, kaj, aliparte, ne estas malfacile transiri la glacimonton Beardmore en la bona sezono. Sed, dum la vojreiro, ne okazis unu tago de vere bela vetero.

Tiu malbela vetero, unu malsana kunulo, tiaj estis la komplikaj, kiuj treege pligrandigis niajn alarmojn. Mi jam diris, cetere, ke ni estis alvenintaj en glacian regionon mal-

facilege transpaseblan. Edgar Evans estis forte impresata de vera cerba ekskuo. Li mortis je natura morto, kaj lia foriro lasis nin tre konfuzataj, tiam, kiam la sezono estis jam finiĝanta.

Tamen, ĉiuj tiuj faktoj, ĉiuj malfacilaĵoj ĉi supre montritaj estis nenio kompare kun la surprizo, kiu atendis nin ĉe la glacia barilo. Mi asertas, ke ĉiuj niaj aranĝoj por la reiro estis perfektaj, ke neniu estulo en la mondo ne povis antaŭscii pri la temperaturo kaj la vetero, kiujn ni renkontis tie je tiu tempo de la jaro.

Inter la 85-a kaj 86-a gradoj de latitudo la temperaturo falis ĝis — 20° kaj — 30°. Sed ĉe la Barilo, je 82-a de latitudo, dek mil futojn pli sube, estis — 30° tage, kaj — 47° nokte, preskaŭ regule; krome, la vento multe suferigis nin dum nia taga irado. Estas certe, ke tiu malbela vetero, kies kaŭzon mi ne komprenas, kaj kiu subite atakis nin, estas la kaŭzo de nia pereco. Mi ne pensas, ke iu homa estulo iam pasigis monaton, similan je tiu ĉi; tamen ni estus povintaj kontraŭstari kaj sukcesi malgraŭ la malbela vetero. Bedaŭrinde alia el niaj kunuloj, Kapitano Oates, malsaniĝis; la brulaĵo mankis kaj fine terura ventego atakis nin je dekkvino da kilometroj de l' deponejo, en kiu ni esperis havigi al ni provizaĵojn. Nia malfeliĉo estis atinginta la supron, ĉar restis al ni brulaĵo nur por unu varma manĝado kaj provizaĵoj nur por du tagoj.

Dum kvar tagoj, estis neeble al ni eliri el nia tendo pro la ventego, kiu furiozis. Ni estas malfortaj; estas malfacile al ni teni la plumon, sed koncerne min, mi ne bedaŭras tiun entreprenon, kiu montras, ke la Angloj povas suferi malfeliĉegojn, interhelpi kaj stari antaŭ la morto kun tiom da kuraĝo, kiel en la estinto.

En nia entrepreno estis riskoj. Tion ni bone sciis. La sorto estis kontraŭ ni, ni ne havas kaŭzon por plendi, sed ni kliniĝas antaŭ la decido de la Providenco, volantaj plej bone fari ĝis la fino. Se ni volonte oferis niajn vivojn al tiu entrepreno, estis por la honoro de nia lando. Mi turnas min al miaj samlandanoj por peti de ili, ke ili zorge atentu, ke tiuj, kiuj dependas de ni, ne estu forlasataj.

Se nia vivo estus daŭrinta, mi estus povinta rakonti pri la kuraĝo kaj la firma elteno de miaj kunuloj, rakonto kiu estus kortuŝinta ĉiun Anglon.



Tiuj ĉi mallongaj notoj kaj niaj kadavroj konigos tiun rakonton, sed estas certe, ke granda kaj riĉa lando, kiel la nia, zorgos pri tiuj, kiujn ni lasas post ni.

R. SCOTT.

25. de Marto 1912.

(El « La Movado ».)

---

## LA SUNO KAJ LA LUNO

(El la mito japana.)

---

Amaterasu-Okami, la diino Suna, aŭdinte, ke en Japanujo loĝadas la dio de nutraĵoj nomata Ukemocino-Kami, elsendis ĉe lin sian plijunan fraton Cukijomi-no-Mikoto, la dion Lunan, por rekonduki kelke da semoj en la ĉielon. La dio Luna malsuprenvenis Japanujon, kaj vizitis la kortegon de Ukemoci-no-Kami. Tiu ĉi sentis grandan honoron havi tian estimindan gaston, kaj bonvenis lin plej ĝentile; li volis regali la gaston je la plej bongustaj manĝaĵoj; unue, li sin turnis je la kampo, kaj elspiris, kaj jen la grenoj kaj la legomoj ekaperis el la elspirita vaporfluo; due, li sin turnis je la arbaro, kaj elspiris, ke la viandoj brutaj kaj birdaj ekaperis el la elspirita vaporfluo; trie, li sin turnis je la maro kaj elspiris, kaj jen la fiŝoj grandaj kaj malgrandaj ekaperis el la elspirita vaporfluo. Poste, li kuiris ĉiujn kaj jen estis faritaj la plej bongustaj manĝaĵoj, kiujn li metis sur la tablo kaj kondukis la ĉielan dion en la manĝoĉambron. Oni esperis, kompreneble, ke la gasto tre kontentiĝos je la ĝentileco de l'bonkora mastro. Sed male, la dio Luna tre koleriĝis, ĉar li opiniis, ke estas tre malĝentile regali la ĉielan dion je la malpuraĵoj eligitaj el la buŝo. Eltirinte la glavon, li mortigis la dion de nutraĵoj, kaj reiris ĉielen. Lia ago kruela tre malplaĉis al la diino Suna; kiu decidis plu ne vidi sian malhumanan fraton, kaj forpelis lin en la regnon de nokto. — Jam forpasis miloj da centjaroj; sed eĉ nuntempe ankoraŭ al la Luno ne estas permesate proksimiĝi je la ĉaro de la Suno pli ofte, ol unu fojon ĉiumonate.

K. NOJARA.

---

## ÉCHOS

**La Saxe Espérantiste.** — Le gouvernement de la Saxe — qui, comme on le sait, jouit d'une large autonomie — vient de faire connaître ses dispositions budgétaires. Il est très intéressant de remarquer qu'il ne craint pas d'affecter un crédit spécial « à la propagande de l'Esperanto », cela en considération des services pratiques que rend déjà cette langue auxiliaire.

D'autre part, encouragée sans doute par cet exemple, la manufacture royale de Meissen, qui produit les merveilleuses porcelaines de Saxe, vient d'éditer un album-catalogue illustré dont le texte est entièrement en Esperanto.

**Esperanto et Religion.** — A Londres, le deuxième dimanche de chaque mois, à 3 heures de l'après-midi, a lieu, à l'Eglise Harecourt, St-Paul's road, Canonbury, N., un service avec lecture de la Bible, sermon, chant d'hymnes, le tout *en Esperanto*.

Cet exemple sera-t-il suivi à Paris ? Cela n'a rien d'improbable : le clergé français compte de nombreux partisans et adeptes de la langue auxiliaire. Déjà même des sermons ont été faits en Esperanto, devant des auditoires cosmopolites, notamment à l'église des Carmes de la rue Vaugirard.

Ce grand progrès pénétrera d'autant plus facilement dans les milieux catholiques que le Pape s'est montré en maintes occasions un fervent approbateur de l'Esperanto.

---

KONTRAŬ  
M A R -  
MAL -  
SANO

**DELPHININE**

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ  
FERVOJ -  
MAL -  
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** de la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Ĉetebila ĉe S-ro **WEITZ**, 8, Rue de Duras, Paris  
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

**Divers.** — Le prochain Congrès International Espérantiste aura lieu à Berne.

— Le Congrès International de la Croix-Rouge à Washington ayant accepté officiellement l'Esperanto, la section Croix-Rouge de Cuba vient d'ouvrir un cours de la langue auxiliaire sous la direction du docteur Alemán Ruiz.

— La Chambre de Commerce de Los Angeles (Californie), vient d'éditer un luxueux Album destiné à faire connaître la contrée aux voyageurs du monde entier. Il est intéressant de noter que cet Album est composé uniquement en langue auxiliaire Esperanto.



## ANTAŬEN !

(Kanto dediĉita al la horo de la « Zamenhofa Artista Adeptaro ».)

*Karaj gefratoj, antaŭen sen timo !  
Gardu kuragon en via animo !  
Nia smeralda standardo kun stelo  
Nin alkondukos sendube al celo.*

*Anstataŭ batalado, nun amo, paco venas,  
Ĉar unu la alian popoloj jam komprenas, —  
Do laŭte, gaje, goje eksonu nia kanto  
Pri nia bela celo, pri kara Esperanto !...*

*Antaŭen do sen tim' ! kun kredo en anim',  
Kun amo en la koro, kun nia verda stel',  
Al nia idealo, al nia bela cel' !*

*Se dum la vojo, renkontas ni baron,  
Ĝi ne timigos jam nian anaron :  
Niaj kunuloj — la amo kaj vero —  
Ĉiam nin helpas en nia afero !*

*Kun kredo, kun espero, kun amo ni laboros,  
Kaj niaj posteuloj nin danke rememoros, —  
Kaj kiam fine venos por ni la lasta horo,  
La mondon ni forlasos kovritaj per la gloro !*

*Antaŭen do sen tim' ! kun kredo en anim',  
Kun amo en la koro, kun nia verda stel',  
Al nia idealo, al nia bela cel' !*

*V. Devjatnin.*



Vera  
 Forhava Salo  
 alsimiligobla  
 ELTROVITA DE  
 M. Maurice ROBIN  
 en 1881.

LA  
**Fer Robin**

mirinde efikas  
 KONTRAŬ  
 SENSANGECO,  
 PALKOLORECO,  
 SANGELFLUOJ  
 ĈIUSPECAJ  
 Akcelas la nutradon kaj  
 neniam mallaksigas.

Tiu ĉi kuracilo, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu manĝo, ĉu en londa akvo aŭ vino. La enhavo de la botoleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn  
**POSTULU** la **ROBIN**  
 VENDEJO POGRANDE:  
**18, Rue de Poissy, PARIS**